

Berlin, 27.04.08

Tre estimata s-rino Lapenna,

Hieraŭ kaj hodiaŭ, la ortodoksoj, do ankaŭ la rumanoj, havis sian Paskofeston. Mia edzino kaj mi havis la plej valoran, plej agrablan gaston: Ivo Lapenna. Ni aŭskultis la diskojn afable senditajn de vi (bedaŭrinde la numeroj I, IV kaj tiu kun la prelego de mia forpasinta amiko Tyblewski *ne funkciis*), ni reaŭskultis la diskon akompanantan la volumon *Eseoj memore al Ivo Lapenna* kaj denove rigardis la fotografajojn fine de la libro, ni konsideris la libron *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj* (kun miaj sennombraj pozitivaj marĝenaj notoj), ni konsideris la *Retorikon*, kun la grava enkonduko, ni eĉ legis kelkajn ĉapitrojn verkitajn de Lapenna en *Esperanto enperspektivo*. Tio estis por ni ambaŭ granda spirita ĝojo. Ne eblas ĉi tie sintezi la multajn kaj validajn tezojn, konsilojn (kion fari, kion ne fari), novajn argumentojn por Eo kreitajn de tiu personeco sen kompara en la E-movado. Mi dubas ĉu iam aperos la dua relative egala al li.

Mi faras jenan proponon : Fine de 2009, certe la E-movado festos la centjaran datrevenon de naskiĝtago de Lapenna. Renkonte al tiu festo, la Instituto Ivo Lapenna devus aperi monumentan libron, kies titolon mi ne povas proponi, por ke ĝi esprimu la grandan valoron de la enhavo. (Mi tamen kredas ke ne estus bonvene aperi ankaŭ la unu-du artikolojn kun personaj kritikoj, kiujn li skribis post 1974, ĉar tio ne helpus la movadon.) Tiu verko montros, ke Ivo Lapenna grave helpas per siaj laboraĵoj kaj modeloj de grandefikaj agoj, la E-movadon, eĉ el sia tombo. Se mi estus almenaŭ dek jarojn pli juna, mi mem verkus la enkondukon de tiu verko, sub titolo : *La granda aktualeco de Ivo Lapenna* - en ĉirkaŭ tridek-kvardek paĝa teksto. Bedaŭrinde mi devas mencii, ke mia verkado en iu ajn fremda lingvo devas *definitive* ĉesi, ĉar, post unu horo de tia koncentriĝo, mia sangopremo altiĝas terure danĝere, kaj mi jam suferas pro du seriozaj malsanoj.

La menciitan enkondukon povus verki la kolego Minnaja aŭ alia persono - certe pli sukcese ol mi ¹⁾.

1) Finance, la libro estus facile eldonebla, se ĝi aperus ne en Okcidentaj landoj. Ankaŭ en Pollando oni postulis 3400 € por mia 652-paĝa libro *Esperanto. Movado, strategio, estetiko, rakontoj*, sed en Rumanio mi pagis nur 1500 € por 100 ekzempleroj, sub kontentigaj teknikaj kondiĉoj.

Tre versajne, la Instituto Lapenna jam planis la libron. Tamen mi faris la proponon, post aŭskultado de grava konsilo kaj samtempe kritiko, de Lapenna, nome tiu, ke la esperantistoj *ne legas*. La libro entenanta liajn paroladojn, prelegojn, la *Retorikon*, kelkajn liajn antaŭajn artikolojn ktp., devas ŝanĝi la senintereson de esperantistoj pri ideoj aperintaj en la E-lingvaj libroj, revuoj, paroladoj ktp. Ne eblas ke niaj aŭtoroj restas sen legantoj ; vaga hobiismo ne regu en movado, kiu celas plurflanke klarigi al la nuntempoj la raciecon de internacia lingvo. La libron de Lapenna oni devus ne nur « legi », sed vere serioze *studi*, komenti, aktualigi per nuntempaj ekzemploj. Oni espereble finfine komprenos, ke nia movado estas kultura, socia kaj plurflanke *scienca*. Sen daŭra scienca preparo, la esperantistoj restas simplaj amatoroj, diletantoj kaj, por la cetera mondo, stranguloj. Nur la forto de la scienco povas doni prestiĝon al nia movado kaj antaŭenigi ĝin. Miakonvinke, la verkoj de Lapenna taŭgas por krei en Esperantio la kutimon legi kaj studi, por gajni la kapablon efike agadi, dum la nepreparita amatoro ridindigas la movadon. Ĉiu esperantisto povus havi je dispono nerefuteblajn argumentojn, kiuj honorigas lin kaj lian agadon. Cetero ni ankaŭ al kutimiĝu respekti kaj admiri, ĉar ne naskiĝas valoraj tie, kie mankas respekto por valoraj homoj kaj por iliaj gravaj atingaĵoj. Bedaŭrinde, en E-io troviĝas ankoraŭ orgojluloj, kiuj sentas sin personecoj, se ili, eĉ malprave, mallaŭdas personecojn.

Kion diri pri la hodiaŭaj improvizitaj teoriuloj, kiuj bombardas la movadon kun falsaj, erarigaj tezoj, celante „klarigi" la nunan « krizon » de la movado, sed ili fakte pliprofundigas ĝin? Ili eĉ iel urĝas kun siaj falsaj opinioj, kvazaŭ ili mem volus realigi siajn negativajn profetaĵojn. En la tempo de Lapenna ili ne havis kialojn kaj eblecon konfuzigi la movadon.

Mi ofte asertis, skribe kaj buŝe, ke Lapenna estis granda oratoro, larĝvida sciencisto, altprestiga personeco, kiu dediĉis siajn kapablojn al la E-movado. Pro tiu sinteno mi perdis kelkajn miajn malnovajn amikojn, sed, skribis antikva filozofo, « Plato estas mia amiko, sed pli granda amikino estas la veraĵo » ; la movado bezonas veraĵojn, ĉar, en kolektivo, partio, movado, ŝtato, ĉie ajn, kie io estas pli grava ol la vero, la dekadenco havas leĝan karakteron.


Lastatempe oni prave dediĉis al meritplena forpasinta Claude Piron, apartan numeron de la revuo « Esperanto » ; kolektivo de interlingvistoj (s-ro Haupenthal kaj aliaj) preparis libron pri la verkoj de Schleyer, kreinto de Volapuko, do la centjariĝo de Lapenna devas celi la revivigon de liaj ideoj. Aŭskultante lin, mi ofte memoris pri la fama eseo de Plehanov *Pri la rolo de la personeco en la historio*.

Nu, vera proverbo diras ke « neniu estas apostolo en sia vilaĝo » : por la homoj ĉirkaŭantaj la « apostolon » li estas nur « unu el inter ili ». Ĉar mi ne renkontiĝis kun Lapenna, mi vidas lin de malproksime, nur kiel historian personecon.

Mia edzino kaj mi sincere bondeziras vin pro via plurflanka agado defende de Lapenna, por ke li ne estu denove entombigita, ĉar liaj pensoj kaj faroj povas grave roli en la movado. Vian sindomenan laboron ne kaŭzas simple la ambicio montri, kia homo estis via edzo, sed vi vere kaj prave estas konvinkita pri lia ege aktuala valoro. Mia edzino kaj mi estas certaj, ke ne nur komprenebla amo ludis rolon en viaj rilatoj kun Lapenna, sed ankaŭ la « spirita parenceco ». Ni povas lin kompreni: Ne nur viaj juneco kaj beleco fascinis lin, sed ankaŭ viaj spiritaj kvalitoj. Miaopinie, la E-movado ŝuldas al vi grandan dankon.

Altestime via I.

F. Bociort



P.S. : Tiu ĉi letero ne entenas multe pri Lapenna, sed, se vi kredas utile, vi povas aperigi ĝin (aŭ parton de ĝi).